

TEA-BULTENO

17^A JARO

JANUARO - FEBRUARO 2014

NUMEROJ 1-2

Tragika mezurilo pri la valoroj de nia civilizacio estas, ke ekzistas neniu negoco pli bona ol milito.

Douglas Mattern (1933-2011)

Karaj Geamikoj!

For la 2013^{an} jaron kiu alportis tro grandajn kvantojn da problemoj al la tuta homaro, en la plej diversaj sektoroj, ekde la financa-ekonomia, socia kaj sociala, sanitara, instruada, politika, jura, ĝis la plej kuntreninta problemoj pri malpaco tra la mondo, kaj bonvenon al la 2014^a al kiu ni ĉiuj rigardas kun grandaj esperoj je pliboniĝoj ĉiuspecaj.

Antaŭ ol cerbumi pri ĉi redaktanta enkonduko, mi relegis tiun pasintjaran kaj rimarkis, ke ĝin mi povus tutsimple kopii kaj ree prezenti al vi, ĉar nenio ŝanĝiĝis. Malespere, mi alprenis la decidon daŭrigi post kelkaj horoj, esperante ke inspiro subite kaptos min, kaj - por distriĝi - prenis el la bretaro iun libron: temis pri la revua kolekto 1889-1895 de "La Esperantisto". Hazarde ĝin mi malfermis, kaj tuj kaptis mian atenton la artikolo "Jubileo de tabako" en la rubriko "El la mondo". "Jen interesa aktualaĵo, malgraŭ ke ĝi estis aperinta antaŭ pli ol jarcento!" - mi ĝoje ekkriis. Elleginte ĝin, mi decidis ke tio ĉi ornamos la 1^{an} paĝon de la 1^a numero de la Bulteno en 2014. Nu, jen ĝi por Vi!


Jubileo de tabako

El "La Esperantisto" Januaro 1893, No. 1

La kvarcenta jubileo de la eltrovo de Ameriko prezentas ankaŭ tian saman jubileon de la eltrovo de la tabako. Kristoforo Kolumbo en siaj memoraĵoj lasis detalan sciigon, en kia maniero la homoj konatiĝis kun tiu ĉi kreskaĵo. La glora maristo alvenis kun sia ŝiparo al la bordoj de Kubo. La Hindoj, ekvidinte de malproksime blankajn homojn, forkuris. Tiam Kolumbo sendis post ili du ŝipanojn, kiuj, veninte en la hindan vilaĝon, ekvidis multajn hindojn, kiuj tenis en la buŝo iajn torditajn kaj ekbruligitajn foliojn, kies fumon ili elspiradis. En tia maniero estas eltrovita la tabako, kiu de tiu tempo ricevis multajn amikojn kaj kontraŭulojn. Ankoraŭ Bartolomé de Las Casas (*ndr: hispana katolika episkopo, defendinta la rajtojn de la amerikaj indiĝenoj*) predikis kontraŭ la moro de fumado, kiun oni heredis de la kolonianoj, sed la tuta elokventeco de la glora misiisto restis senfrukta. La unua en Eŭropo kontraŭulo de fumado de tabako, Jakobo la 1^a sin esprimis: "La pasio fumi tabakon estas abomena kaj danĝera tiel por la kapo, kiel ankaŭ por la pulmoj." En Hispanujo la granda inkvizitoro Bartolomeo en la jaro 1659 malpermesis al la pastroj fumi tabakon en la daŭro de unu horo antaŭ la Diservo kaj du horoj post la Diservo, kaj sub minaco de ekskomuniko kaj de la plej severaj punoj malpermesis al ĉiuj flari tabakon en la daŭro de la Di-

servo. La papoj Urbano la 8^a kaj Inocento la 4^a eldonis bullojn malpermesantajn la fumadon, kaj en tiuj ĉi bulloj la buŝo de persono fumanta estis komparata kun forno de diablo. La Sorbono, invitita doni sian opinion, ne donis respondon decidan, kaj la jesuitoj permesis fumi kaj flari tabakon tiom, kiom ĝi servas al la digestado kaj al la sano. Ludoviko la 14^a estis granda malamiko de tabako kaj malpermesis uzi ĝin ĉe la kortego. La sultano Murado la 4^a punadis la fumantojn per morto. En Persujo oni la fumantojn batadis sur stangon, tamen ĉiuj tiuj ĉi malpermesoj neniom helpis kaj la pasio fumi tabakon disvolviĝis ĉiam pli multe. Richelieu, kiu pasie amis flari tabakon, la unua metis sur tabakon depagon en la alteco de 2 frankoj por ĉiuj 100 funtoj. En tia maniero la tabako de la jaro 1674 fariĝis fonto de enspezoj por la regno kaj alportis al la regna kaso milionojn.

Interesa, ĉu ne? Precipe ĉi lasta frazo! Ankaŭ por la itala ŝtata kaso estas granda avantaĝo, ke oni ne ĉesigu la fumadon, dum samtempe oni kampanjas kontraŭ ĝi. Promulgita leĝo diktas - prave! - ke en neniu publika ejo estu permesite fumi; sur la cigaredpaketoj nigre-diklitere estas priskribitaj la danĝeraj efikoj de fumado. Krome, jam de dekoj da jaroj ne plu eblas reklami ian ajn cigared-markon. Grandaj diskutoj ekestis je la apero de la tiel diritaj "elektronaj cigaredoj" sur kiuj la Ŝtato je certa momento ekhavis la ideon apliki impostojn, kio tuj provokis reagojn de kontraŭuloj kaj malkontraŭuloj. Lastminuta informo plue klarigas, ke pro la drasta reduktado de tabak-konsumado ekde la komenco de la pasinta jaro, oni estas pristudenta, kiel kompensi tiun perdon. Konsidere ke tiu laŭleĝa drogo plenigas per ne bagatela enspezo la nuntempe preskaŭ malplenajn naciajn kasojn, kion oni nun eltrovos? Tio venigas miamensen alian tre seriozan nuntempan 'malsanon', nome la pli kaj pli disvastiĝanta problemoj de la hazard-ludemuloj. En ĉiu ajn loko oni muntas tiujn damnajn maŝinetojn, englutantajn avide la monon de miloj kaj miloj da personoj. Alia maniero forĵeti monon, estas ankaŭ veti ĉe loterioj, aŭ aĉetadi sennombrajn t.n. "skrapu kaj gajnu"-n, aŭ ludi per kartoj en interreto ... dume, televide, oni povas spekti reklamfilmetojn pri diverspecaj hazardludiloj, kun alloga frazo 'facile estas gajni monon' tiuometode: je la fino de la reklamaĵo, tamen, (hipokrite!) tre prudente, oni rekomendas: "ludu sen troigi. Ludo povus kaŭzi dependiĝon"!!! Sed feliĉu, ĉar oni jam starigis/as ambulatoriojn kaj disponigas kompetentajn psikologojn por helpi tiujn trafitaĵojn de ludomanio koste de la kutimaj impostopagantoj! Bonan Novan Jaron al ĉiuj! Via redaktanto



Novan rubrikon ekde ĉi numero vi trovos en TEA-Bulteno: temas pri serio de dek du rakontoj el Butalci (Butalanoj), libro de la slovena verkisto Fran Miličinski, traduke de Janez Zadavec. Ĉiun duan monaton estos ebleco legi unu aŭ du noveletojn, do tio signifas ke dum la tuta jaro ili estos ĝueblaj. Mi kredas, ke en ĉiu lando ekzistas iom similaj anekdotoj priskribantaj humure kaj satire la plej strange absurdajn sintenojn kaj kondutojn de la homoj. Estus interese ekscii pri iel similaj alilandaj rakontoj, por komparo kaj ... kial ne? por simple amuziĝi, en klopodo forgesi la pli "nigran" realon!

La libreto estis tradukita okaze de la 100-jariĝo de la unua Esperanto-societo en Maribor, septembre 2010, kaj de la samjara proklamo de Ljubljana kiel monda ĉefurbo de la libro.

Vortoj de la tradukisto

Tiu ĉi libreto estas mia kvara libroforma kontribuo al nia movado. La unuaj tri – Internacia lingvo Esperanto kaj lingva demokratio; Kontribuo por la historio de la movado por internacia lingvo Esperanto en Slovenio; Homoj kaj okazaĵoj en la movado por internacia lingvo Esperanto en Slovenio – estas la slovenlingvaj kaj informcelaj, sed tiu ĉi traduko de "Butalci" el la slovena al Esperanto estas animcela. Nome, post pripenso, kaj konsiderante la enhavon de tiuj ĉi rakontoj, mi faris tiun tradukon pensanta pri niaj gvidantaj politikistoj – ekde mia vilaĝo tra Eŭropo ĝis Unuiĝintaj Nacioj! Jen tiusenca komparo, konsiderante la stilon de la verkisto: ie en sunflanka parto de Alpoj kuŝas lando - ŝtato nomata. Loĝas tie hejmlandanoj - nacio nomata. Kaj regas tie homgrupoj - politikaj partioj nomataj. Ili plej ŝatas ludon - demokratio nomata, en la konstruaĵo - parlamento nomata. Kaj ne dubu, ankoraŭ hodiaŭ daŭre ili venkas la prudenton – tiaj ili estas! Kaj nun, kara leganto, vi mem daŭrigu tian kontributon ...

Tradukante tiun ĉi libreton, mi rimarkis ĉe la verkisto similajn trajtojn kiujn havas "Bona soldati Švejk" de Jaroslav Hašek. Ĉu pro tio, ĉar ankaŭ la patro de Fran Miličinski estis Ĉeĥo? Krome, post pripenso, mi tradukis nur tiujn rakontetojn, kiuj miaopinie estas internacie kompreneblaj, do ne tro loke specifaj. Tradukante mi klopodis imiti la simplan lingvaĵon, mallongajn frazojn kaj spritecan logikon de la verkisto. Fakte la slovena vorto "butati"

signifas "frapi kontraŭ io". Pri la vorto "butalci" = "butalanoj", la verkisto klarigas, ke temas pri personoj, kiuj per kapfrapo kontraŭ la malamiko solvas la problemojn. Ĉar mi ne estis kontenta kun similaj unuvortaj signifoj en Esperanto (ekz. Kapfrapuloj, Durkapuloj, Malsprituloj...), mi lasis la originan vorton. Nome, la plej proksima traduko de la vorto "Butalci" kredeble estus "kapfrapulejo", sed jam la sekva nomigo de la vilaĝo "Kapfrapulejo" ne plaĉis al mi. Do "butalci" = butalanoj" restas loĝantoj de la vilaĝo Butale.

FRAN MILIČINSKI

Li estis unu inter la malmultaj slovenaj humorverkistoj. Li naskiĝis en la jaro 1876 en Lož kaj en 1871 la familio translokiĝis al Ljubljana. Lia patro estis Ĉeĥo kaj patrino Slovenino.

Fran Miličinski diplomiĝis en juro, kaj postenis dum multaj jaroj en Ljubljana kiel juĝisto por junularaj aferoj. En la jaro 1920 li fariĝis konsilanto de la plej alta ŝtata juĝejo en Zagrebo. Post kvinjara laboro tie, li emeritiĝis kaj daŭrigis labori en Ljubljana kiel advokato ĝis sia morto en 1932.

Kiel verkisto li skribis multajn porjunularajn rakontojn kaj precipe humuraĵojn, kiuj aperis kiel libro-kolektoj aŭ en diversaj gazetoj. Tiel li plej ofte reagis al diversaj familiaj, kulturaj aŭ politikaj okazaĵoj en tiu tempo. Li kapablis sprite kaj amuze moki pri la ridindaĵoj, sed fakte li estis serioza kaj kritikema observanto de la socio. Nur malmultaj humorverkistoj slovenaj atingis lian spritan nivelon.

Janez Zadavec

1. Butale kaj Butalanoj

La libro "Butalanoj" enhavas ridindajn rakontojn pri la Butalanoj, kvankam oni vane serĉus tiun vilaĝon en geografia mapo. La verkisto diras, ke la unuaj Butalanoj ekloĝis apud riveroj Drava kaj Mura – kelkaj eĉ maron atingis – sed ili restis ĉiam la samaj. Tiusence oni renkontas Butalanojn diversloke, do ĉie, kie la konduto estas "butaleca". Nu, kaj ĵetu la ŝtonon, kiu neniam simile kondukis!

Tamen, kie mankas la prudento, aperas malbonaj ecoj kiel timemo, envio, avaro kaj konkurso. Kion la najbaro havas – eĉ se temas pri ĥolero, falsa kredo aŭ spado de estro fajrobrigada – tion ankaŭ la Butalanoj nepre devas havi. Kaj vanta la Butalano estas kaj tial diras: "se mi ion ne scias, mi pri tio aliajn in-

struos!" Kaj ofte ili kondutas jene: kion ili ne vidas aŭ ne povas vidi, tio por ili ne ekzistas!

Do, tri horojn da piediro post karnavala dimanĉo, kuŝas vilaĝo - urbo nomata. Meze de la vilaĝo fluas akvaĉo - rivero nomata. Ambaŭflanke de tiu akvaĉo staras kabanoj - domoj nomataj. Du aŭ tri inter ili havas etaĝon, kaj tial ili estas - kasteloj nomataj. Nomo de tiu vilaĝo estas Butale.

Estas nesupereblaj tiuj Butalanoj: tiujare, kiam du bovinoj valoris unu paron, la Butalanoj ekkverelis kun prudento, kaj vi ne dubu – venkis Butalanoj kaj ne la prudento. Tiaj ili estas!

2. Kiel la Butalanoj salon semis

Estis por Butalanoj malagrabla, ĉar ili devis la salon aĉeti kaj de malproksime alporti. La vojaĝo

kostas, la salon oni devas pagi, kaj eĉ okazas ke oni ne havas ĝin kiam en la kuirejo plej necesas. Sed hejme tero abundas, kaj sur ĝi ĉio ebla kreskas. Tial la Butalanoj decidis, ke la salon ili mem hejme perlaboros.

En printempo ili preparis la teron ĉirkaŭ siaj domoj kaj semis la salon. Tiel la dommastrinoj havos ĝin ĉemane same kiel aliajn verdaĵojn.

Venis poste pluvo, suno brilis kaj ĝoje la Butalanoj atendis. Fakte elkreskis juna verdaĵo, kreskis abunde kaj promesis abundan rikolton. Sed tiu abunda verdaĵo estis junaj urtikoj kaj nenio alia!

Rigardis tion ĝoje la Butalanoj, prenis la folietojn kaj metis ilin sur la langoj. Jes, ĝi ege brulvundis! Tiam ili kontentaj diris: "Aŭŭŭ, tiel juna kaj jam tiel forta, kaj kiel forta ĝi fariĝos, danke al dio, kiam ĝi maturiĝos!"

PLIOFTAJ PARONIMOJ

Nia amiko VIGLO sendis plian vortvicon. Ĉu li laŭpece laboras? Kiu lin salajras?

Pubo	(Md) malsupra parto de ventro har-kovrita	Reflekso	(Md) movo sendependa de volo
Pubio	(Md) antaŭa parto de koksosto	Reflekto	(Fk) resendo de radio (luma, elektrona ks) fare de korposurfaco
Pudo	(Te) rusa mezurunuo de pezo	Refrakto	(Fk) direktoŝanĝo de radio traŭranta du malsame densajn mediojn
Pudoro	sentemo pri sia aŭ aliula korpo rigardata kiel seksobjekto	Regi	administri kiel supera ĉefo; direkti kun estra povo; havi povon; obeigi
Putoro	(Zo) Sp. de mustelo (<i>Mustela putorius</i>)	Reĝi	(Fz) esti dumviva regnestro
Pulio	(Te) rado kun randa kanelo turniĝanta ĉirkaŭ akso	Regolo	(Zo) G. (<i>Regulus</i>) de tre malgrandaj birdoj el la ordo de paseroformaj
Pullo **	(Fi) trusto; okaza kunaranĝo de entreprenoj	Regulo	difinita kodo por gvidi; principo; metodo
Pulo	(Zo) malgranda insekto (<i>Pulex</i>), senflugila, saltegmenta, sangosuĉa	Reklami	anonci, rekomendi al publiko per ĉiuspecaj rimedoj
Puso	(Md) densa flaveta likvaĵo, produktiĝanta en abscesoj	Reklamacii	plende postuli ion, kion oni rajtas ricevi
Puŝo	forta ekpremo; frapo, bato, penanta forigi de okupita loko	Renversi	inversigi, faligi ion, ruinigi, detrui
Rabo	perforta forpreno de ies posedaĵo	Reversi	(Do) rekudri eluzitan veston, eksterigante la internan flankon
Rabio	(Md) mortiga infekta malsano	Resigni	denove signi
	(f) furioza pasia ekscitiĝo	Rezigni	definitive forlasi kiel neatingeblan
Racio	(Fz) mensa strukturo servanta por malkovri la leĝojn de la universo	Resoni	(Te) daŭre, intense estigi aervibradon
Razio	(Fz) rabekspedicio	Rezoni	(Fz) logike argumenti kaj konkludi
Razilo	(Ur) vastaskala polica arestado	Respondi	demandite, diri; reciproki per diroj ks
Razilo	(Te) ilo uzata por fortranĉi harojn	Responsi	(pri, pro) respondeci; devontigi sin porti sekvojn de ago, faro
Rajdi	iri, sidante sur dorso de besto, ĝin gvidante	Rifuĝi	serĉi ie protekton
Rajti	prave havi povon plenumi agon, predisponi kaj uzi aĵon, postuli ion	Rifuzi	ne voli akcepti, doni, fari
Rakedo	(Sp) plata kadro por ĵeti pilkon, kun tenilo	Roso	(Me) akvogutetoj sur supraĵo de plantoj
	(Sp) analogforma aparato, sen tenilo, ebliganta paŝi sur neĝo	Rozo	(Bo) G. (<i>Rosa</i>) de arbustoj kun belaj bonodoraj floroj
Raketo	(Be) arta fajraĵo	Rosmaro	(Zo) Sp. de mara mamulo (<i>Odobenus rosmarus</i>), vivanta en arktaĵaj regionoj
	(Te) spacpafaĵo	Rosmareno	(Bo) G. (<i>Rosmarinus</i>) de mediteraneaj arbustoj el lamiacoj
Ralo	(Zo) G. (<i>Rallus</i>) de malgrandaj vadbirdoj el ordo de gruformaj	Rubo	(Te) restaĵoj de ruinigita konstruaĵo; forĵetindaj rompitaĵoj
Ralio	(Sp) aparta speco de konkurso, kun plenumo de elprovoj		(Ge) defalinta ŝton- aŭ ter-amaso surkovrantaj la originan grundon
Ramo	(Te) trabo por rompi murojn	Rubuso	(Bo) G. (<i>Rubus</i>) de tufarbustoj, lianoj k herboj el rozacoj, el kiuj kelkaj estas ĝardenaj trudplantoj
	(Te) maŝino por enbati	Ruĝo	(Be)(Te) koloro sama kiel sango, rubeno ks
Ramio	(Bo) G. (<i>Ramium</i>) ne legitima nomenklaturado de → bernerio	Ruĝo	(Te) ruĝiga lipŝminko, ruĝigilo
Raŭndo	(Sp) ĉiu parto de boksmatĉo	Rulado	ago de tiu, kiu movas objekton, ĝin turnanta
Rando	ĉirkaŭa ekstrema parto de surfaco		(Be) samsilaba gamkanto
Rondo	(Mt) pli malpli regula cirklo	Ruleto	(Sp) hazardludo
	(Fz) aro da personoj kun samaj interesoj; klubo		(Te) (evi) = rultranĉilo
	(Te) radioamatora kontakto		
Rondaŭo	(Be) franca fiksforma poemeto el dek tri versoj		
Rundo	(Ur) kontrola rondirado		

** Malofta ekzemplo de duobla konsonanto.



Kio okazos, en 2014, en Gresillon? PRINTEMPAŝ! Kiam? De la 26^a de aprilo ĝis la 4^a de majo 2014. Por kiuj? Por tiuj kiuj emas lerni, ĉeesti kursojn gvidotajn de lertaj kaj spertaj instruistoj: Radojca Petrović kaj Christophe Chazarein. Eblos eĉ KER-ekzaminiĝi.

Fringoj! Festa Renkonto Internacia de Geknaboj. Kiam? De la 4^a ĝis la 11^a

de majo 2014. Por kiuj? Por geknaboj inter 8 kaj 17 jaroj, por tiuj kiuj emas vojaĝi, viziti Parizon, konatiĝi kun novaj geamikoj, kunloĝi en belega kastelo, por tiuj kiuj ŝatas muziki, danci, teatraĵi ... Pliaj informoj: <http://gresillon.org>



Tiĉ kaj tiĉ pluketante...

El Novaĵservo Ret-Info

Ĵus estis lanĉita nova lud-paĝo: la "Verda Ŝtelo"! En la interesa ludo, el unuopaj literoj vi devas krei aŭ kombini Esperantajn vortojn – aŭ vi povas ŝteli ĝin de via partnero...

Vi povas ludi ĝin sola, kun hazarda partnero, aŭ kun viaj amikoj. Pri la reguloj legu la helpo-paĝon! Adreso de la ludeja retpaĝo: <http://gemelo.org>
Gratulon al la kreinto Neil Roberts!

Freŝa rekordo: 3000 kantoj en la Libera Esperanto-Kantaro! Kiel rezulto de multjara agado, en la vikia kantaro troveblas jam tekstoj de 3000 Esperanto-kantoj! Inicijato, ĉefa laboranto kaj multjara motoro de la projekto estas Aleksej (Ljoŝa) Kuznecov el Rusio, ka2pink@gmail.com. Gratulojn al li pro la grandega laboro.

Adreso: <http://kantaro.ikso.net/>



Per Esperanto reklamas Heineken

La hispana bier-entrepreno, en sia Twitter-kanalo, reklamis en Esperanto (aŭ, pli bone, montris Esperantlingvan reklamon) honore al la Esperanto-tago, la 15^a de decembro.

Vidu: https://twitter.com/Heineken_ES/status/412543397551816705/photo/1

Traduko de la hispanlingva mesaĝo: Jen malgranda enigmo... hieraŭ oni festis la Tagon de Esperanto!

El Gazetaraj Komunikoj de UEA
Fabrício Valle, la nova redaktoro de la revuo *Esperanto*, invitas vin al ĝia kuna kreado

Fabrício Valle verve laboris por lanĉi sian unuan numeron, la januaron, sub sia redaktado. Nun ĝi estas "libere gustumebla" ĉe la retejo de UEA. La redaktoro bonvenigas materialojn por la postaj numeroj. Por gardi la freŝecon de la revua enhavo li emfazas, ke la novaĵoj, artikoloj kaj aliaj kontribuoj estu novaj kaj ne jam aperintaj en retaj listoj aŭ aliaj gazetoj kaj forumoj.

Oni prefere sendu la kontribuojn retpoŝte - redakcio@revuoesperanto.org - sed, se necese, eblas sendi ilin ankaŭ paperpoŝte al: Revuo 'Esperanto', p/a Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, Rua Faustolo 124, BR-05041-000 São Paulo, Brazilo.

La redaktoro bonvenigas ankaŭ proponojn pri artikoloj kaj ĉiajn komentojn pri la revuo. Jam estas kreita speciala reta komunumo 'Legataro de la revuo *Esperanto*', kie la nova redaktoro pretas rekte respondi demandojn kaj komentojn de siaj legantoj. Ĉiu kiu volas aktive partopreni en la kreado de la revuo, povas aliĝi al la komunumo.

Demandoj direktitaj al triestanoj, sed... ne nur!

Baldaŭ finiĝos ĉi tiu serio da demandoj/respondoj pri Triesto. Mi iom bedaŭras, ĉar mi multon lernis dum mia esplorado. Kaj kiel estis ĝi por vi? Ĉu interesa? Ĉu enuiga? Ĉu neleginda? Nu, malmultajn komentojn dume mi estis ricevinta: ekzistas proverbo laŭ kiu "kiu silentas, tiu konsentas", do tiuokaze mi povas gratuli min mem pro trafikaj distraĵoj publikigitaj en la triesta informilo. Kaj nun al vi ankoraŭ unu kvaropo.

- 1) La Julia Venetia Polico estis speciala policokorpuso starigita de la Aliancana Milit-Gubernio fine de la Dua mondmilito en la 'Zono A' de Julia Venetio. Kiel la triestanoj 'rebaptis' la policanojn de tiu korpuso?
- 2) Kio estas "zoppolo", kies nomon prenis unu el la strandoj – *Canovella de' Zoppoli* [Kanovella de' Zòppoli] – alirebla nur tra krutaj padoj kaj ŝtuparoj de la marborda triesta vojo?
- 3) La Konservatorio *Giuseppe Tartini* estas unu el la dek tri historiaj muzikaj superlernejoj en Italio. En kiu jaro ĝi estis fondita? 1803, 1833 aŭ 1903?
- 4) *Jan Morris*, renoma kimra verkistino, dediĉis al Triesto belan libron, titolitan: 'Triesto kaj la signifo esti nenie' (*Trieste ed il significato di non essere da nessuna parte*). La dek ok ĉapitroj ĉerpis inspiron el samtiomaj poŝtkartoj senditaj de Triesto, tuj post la dua mondmilito, de la juna brita oficiro *James Morris*. Ĉu temis pri hazarda homonimeco aŭ li estis ŝia parenco?

Kontrolu la ĝustecon de viaj respondoj je 5^a paĝo .

NIA VIVO

Bildstrioĵ de Singer (Usono) – Komentoj de Viglo.

(daŭrigo el la antaŭa Bulteno)



MATURAĜO

Ĉu li finfine sukcesis?

(daŭrigo venont-Bultene)

Individua poŝtmarko




Ankaŭ Esperanto-Ligo Filatelista - Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj (ELF-AREK) havas sian poŝtmarkon! Bele surprizitaj estis ĝiaj membroj, ricevintaj en 2013 la decembran organon LA VERDA LUPEO en koverto, afrankita per la slovenaj poŝtmarkoj (vd. la priajn bildojn!). La mendo estis farita la 18^{an} de septembro 2013 ĉe la Slovenia Poŝto, danke al la helpa kunlaboro de la slovena esperantisto Osto Kristan. La poŝtmarko kun nominalo A validas por enlanda letero, dum tiu kun nominalo D por leteroj al Eŭropaj landoj. La enkadrita bildo estis kreita en 1973 de Hermann F. Menges el Nederlando, kaj ĉi-okaze prilaborita de la komputilgrafikisto Eraldo Sepulcri el Triesto.



Inf. E.D.

Respondoj al demandoj pri Triesto:

- 1) "Cerini" estas la nomo, ĉar la unua uniformo de tiuj policianoj estis nigra kun milita usona kaskeo blanka, tiel ke la tuto revokis al la memoro, kiam ili estis envicigitaj, la alumetojn nomatajn "cerini". (nrd: *cerino* - alumeto farita el papero tute ŝmirita per vakso). Ili plenumis sian servadon, de post 1947, en la zono de la Libera Teritorio de Triesto, ĝis la 26^a de oktobro 1954.
- 2) "Zoppolo" estas malnova barko simila al pirogo, tipa de la triesta golfo kaj de la dalmatia marbordo. Ĝi estis utiligita de la lokaj fiŝistoj ĉefe por kapti tinusojn, ĝis post la Unua mondmilito. La barkoŝelo estis farita el ununura trunko de ruĝa aŭ mara pino, elhakita ĝis 5-8-centimetra diko: al tio aldoniĝis du lignaj tabuloj por plialtigi la randojn kaj tiel pliigi la ŝarĝeblecon. Averaĝe la "zoppolo" estis longa 7 metrojn, larĝa 0,70 metron kaj alta 0,60. Ĝi estis manovrita per du remiloj longaj pli ol ses-metra kaj la stiristo remis starante. Modelo de tiu barko estas eksponita en la Mara Muzeo.



- 3) Ĝi estis fondita oktobre 1903 en la prestiĝa Palaco Rittmeyer.
- 4) La verkistino nomiĝis tiele, *James Morris*, ĉar ŝi estis registrita kiel viro. En 1972, aliĝinte virino, ŝi ŝanĝis sian personan nomon al *Jan*.

BULTENO DE TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - mardo 17.30-20; vendrede 19-21

Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio

Poŝtĉekkonto N° 10834349

Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936

Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it

Grupaj tt-etoj: www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org

Kvizo de Elda

Ĉi-foje, enviema pri lia tutmonda sukceso, mi deziras konkurenci kun nia nelacigebla, cerbotiklanta Viglo, ankaŭ por havi konkretan pruvon ke vi, ĉiun duan monaton, tre atente legas - ekde la komenco ĝis la fina punkto - la TEA-Bultenon.

Se vere diligente vi plenumis vian 'devon', bonvolu respondi al la jenaj demandoj:

Kiom da kaj kiaj eraroj plenigis la novembran-decembran Bultenon?

Se vi sukcesos enlistigi ĉiujn aŭ almenaŭ la 90-procenton da ili, vi ricevos specialan premion de la redaktanto mem! Limdato: la 14^{an} de februaro 2014. Bonan ĉasadon!



Januara Programo

3a, vendredo	20h00 - Bonvenon, Nova Jaro!
7a, mardo	17h30 - Gasto en TEA-sidejo: Folkmar Keller
10a, vendredo	14h40 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno: Aktivado de TEA en la Nova Jaro 20h00 - Gasto en TEA-sidejo: Folkmar Keller
14a, mardo	17h30 - Dua-grada kurso
17a, vendredo	20h00 - Plurvoĉa legado de la libro 'LA KAPREOLIDO PIRGO', prezentita dum la Zamenhofa Tago en Triesto
21a, mardo	17h30 - Dua-grada kurso
24a, vendredo	20h00 - El nia monda Literaturo
28a, mardo	17h30 - Prezento de unuagrada kurso - Dua-grada kurso
31a, vendredo	20h00 - Fotoj pri Israelo (Elda)

Februara Programo

4a, mardo	17h30 - Unua- kaj dua-grada kursoj
7a, vendredo	14h40 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno: 9 minutoj kun ... 20h00 - Vortoj, terminoj, neologismoj... - trafoliumado de vortaroj
11a, mardo	17h30 - Unua- kaj dua-grada kursoj
14a, vendredo	20h00 - Plurvoĉa legado de la libro 'LA KAPREOLIDO PIRGO', de A. Martić, en la traduko de Josipa Katunar
16a, dimanĉo	10h30 Ĝenerala TEA-Asembleo
18a, mardo	Sidejo fermita
21a, vendredo	20h00 - Programo kun Elena
25a, mardo	Sidejo fermita
28a, vendredo	20h00 - La patrino lingvo, je l' radiokoj de identeco

Kiam vi konstatas ke vi samopinias kiel la plimulto, tiam estas la momento halti kaj pripensi.

Mark Twain (1835-1910)

ORDINARA JARA ASEMBLEO DE TEA

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos **dimanĉon la 16^{an} de februaro 2014 je la 10h00, unua kunvoko, kaj je la 10h30, dua kunvoko.** Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro da partoprenantoj.

TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj la sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 2013:
 - a) Morala raporto de la prezidanto (*Edvige Ackermann*)
 - b) Agadraporto de la sekretario (*Elda Doerfler*)
 - c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto (*Edvige Ackermann*)
 - ĉ) Deklaracio de la revizoroj (*Amalia Zerpini - Elio Nocent*)
 - d) Raporto de la triesta katedro (*Elda Doerfler*)
4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

DELEGILO

La asociano _____

estas delegita anstataŭi min ĉe la Jara Asembleo de TEA, okazonta dimanĉon la 16^{an} de februaro 2014.

Subskribo _____

Dato _____

Notu bone!

Okaze de la Asembleo eblos pagi al la kasisto la renovigojn de TEA-kotizo, FEI- kaj UEA-membrecoj, abonojn al diversaj ĵurnaloj kaj revuoj, aliĝon al UK ktp ktp. La sekretario peras abon-pagojn al LA GAZETO kaj membro-kotizojn de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista—Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj).